La libro de la semajno

Raymond Schwartz

"...kun sia speca spico"

Prezo 12,-- GM

PILO-PRESS

Internacia Informservo

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 18/1974 22 majo 1974

Aperas ĉiusemajne

## Radia invito al la UK en Hamburgo

Varsovio/Hamburgo (PP) Kadre de la Koncerto kun bondeziroj en la Esperanto-Elsendoj de Pola Radio la prezidanto de LKK de la UK Hamburgo salutis ĉiujn ĝisnunajn aliĝintojn al la kongreso kaj esprimis la deziron, ke ankoraŭ multaj geesperantistoj aliĝu al la kongreso.

Kvankam principe laŭ la oficiala komuniko la aliĝoj por Hamburgo estas akceptataj nur ĝis la 20-a de junio 1974, la ĝisnuna nombro de aliĝoj permesas akcepti novajn kongresanojn ĝis la lasta momento, eĉ en la kongreso mem. Tiuj, kiuj emas fari siajn decidojn lastmomente, tamen atentu, ke estas pli avantaĝe aliĝi ankoraŭ antaŭ la 20-a de junio. Post tiu dato aplikiĝas speciala krompago de pliaj 25,- guldenoj (25 GM) pro la malfrua aliĝo. La solaj esceptoj estas tiuj kun pasportaj aŭ transpagaj malfacilaĵoj, kiuj ĝustatempe sendis aliĝilon al la konstanta adreso en Rotterdam laŭ la instrukcioj publikigitaj pli frue.

## GEA-jarĉefkunveno en Hamburgo

Hamburgo (pp) La jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio (GEA) okazos mardon la 30-an de julio 1974 de la 14,30 - 16,00 horo en salono 6 de la kongresejo de la Universala Esperanto-Kongreso en Hamburgo (Congress Centrum Hamburg).

La estraro de GEA invitas ĉiujn membrojn al tiu laŭstatuta jarĉefkunveno.

Kiel konate aparta germana Esperanto-kongreso en 1974 pro la Universala Esperanto-Kongreso ne okazos.

La raporto de la estraro de GEA pri la agado en la jaro 1973 aperos en Germana Esperanto-Revuo n-ro 3/1974. En la "fina priĵuĝo" oni povas legi:

"Kvankam multo estas farita kaj kelkaj kontentigaj rekonoj okazis, parte neĝojiga situacio restis. La saldo de GEA-agado dum 1973 estas pozitiva.

La estraro alvokas la membrojn dediĉi siajn fortojn al intima kaj intensa kunlaborado kun GEA."

La financa raporto de GEA, kiu montras pluson de 946,85 GM, estos aldonita por la membroj al GER 2/1974, kiu aperas en ĉi tiuj tagoj.

## La eŭropa unuiĝo kaj ĝia lingvoproblemo

Nürnberg (pp) Ĵus aperis broŝuro en la serio "Dokumente-Informationen" en la eldonejo Ludwig Pickel "Die Einigung Europas und ihr Sprachenproblem" de D-ro Werner Bormann.

Ĉiu tiun 12-paĝan broŝuron Germana Esperanto-Asocio uzos por informado al germanaj politikaj instancoj kaj personoj.

La prezo por 1 ekzemplero estas 3,- GM. Mendojn akceptas Libroservo Ludwig Pickel. Por pli grandaj kvantoj validas rabatita prezo.

El la agadraporto de PEA 1973

Varsovio (pp) El la konciza raporto pri la agado de Pola Esperanto-Asocio (PEA) en 1973 ni citas:

"La 1973 jaro karakteriziĝis per la plua kaj konsekvenca realigado de la decidoj de la Landa Kunveno de la Delegitoj de PEA (13.-14.V.72) okazinta en Toruno, tutspeciale en la sferoj de soci-politikaj kaj intern-organizaj aktivecoj, informado, instruado per korespondaj kursoj, eldon-agado(inkluzive la regulan importadon de E-libroj), kaj stabiligo de la financa bazo de la Asocio.

I. Organizaj aferoj: Oni konservis la membrostaton de 3 100 personoj. En la unua jaro de la ekzisto de membroj-subtenantoj de PEA oni membrigis nur 1 300 personojn.

Pri grandeco de la organiza agado atestas la laboro de la oficejo de PEA en Varsovio, kiu akceptis 4 953 kaj forsendis 19 222 korespondaĵojn individuajn, dissendis multobligitajn cirkulerojn kaj diversspecajn informmaterialojn al 27 020 personoj, organizaj unuoj de PEA, gazet-redakcioj k.s. kun la suma nombro de 168 paĝoj.

II. Financaj aferoj: En 1973 oni stabiligis la financan situacion de PEA, oni pagis ĉiujn ŝuldojn (transprenitajn de la antaŭa Ĉefa Estraro inkluzive de pli ol 8 mil guldenoj al UEA), oni samtempe investis monon en kelkajn profitdonajn eldonaĵojn. Oni devas konsideri, ke la Ĉefa Estraro devis mem pagi - sen kiu ajn subvencio - la salajrojn de 10 siaj oficistoj kaj de 6 konstantaj kunlaborantoj kaj ĉiujn ceterajn kostojn.

III. Informado: Multe da atento oni dediĉis al la plua pliintensigo de la intern-organiza informado pere de "Pola Esperantisto", cirkuleroj kaj pollingvaj informiloj.

En la sfero de la ekstera informado oni daŭrigis la dissendadon de nacilingvaj bultenoj al la redakcioj de amaskomunikiloj en Pollando; oni daŭrigis la pli proksiman kontakton kun 10 gazetoj regule aperigantaj inform-materialojn pri E-o. Sume en 1973 aperis en la pola gazetaro 3347 informoj, notoj kaj artikoloj pri E-o.....

En 1973 venis al la oficejo de PEA 15 312 leteroj kun demandoj pri E-o kaj ebloj lerni ĝin. Por kontentigi tiujn demandantojn oni eldonis kaj distribuis 8-paĝan broŝureton pollingvan de A. Pettyn "ABC jezyka esperanto" (ABC de la lingvo Esperanto) en la suma eldonkvanto de 17 milekzempleroj.

IV. Instruado: Oni daŭrigis la nedevigan instruadon en pli ol 100 diversgradaj lernejoj (precizaj nombroj mankas).

Apartan atenton oni dediĉis al la korespondaj kursoj, kiujn en la tutlanda skalo gvidis nur la Ĉefa Estraro de PEA. Pri tiaj korespondaj kursoj demandis 15 312 personoj, el inter kiuj preskaŭ 4 000 jam komencis lerni.

En 1973 la Ĉefa Estraro prezentis al la Ministerio pri Klerigo kaj Edukado kompleksan projekton de la instruado de E-o al plenkreskuloj, kiun la Ministerio tutece akceptis en la formo de aparta dokumento kun suplemento: "kursa principaro".

V. Eldon-agado: PEA aperigis "Esperanto-polan vortaron" de Jan Zawada (3 000 ekz.), "Esperanto-polan vortaron" de Tadeusz J. Michalski (5 000 ekz.), "Esperanto laŭ amuz-metodo" (legolibro kun ekzercoj) de Andrzej Pettyn (3 000 ekz.), "Jes, mi parolas Esperante"(ekzercaro por korespondaj kursoj) de A. Pettyn (1 800 ekz.),"Praktika kurso de Esperanto" (lernolibro por komencantoj) de A. Pettyn en tri kajeroj (3 500 ekz.).

Dank' al la klopodoj de PEA aperis krome ĉe "Wiedza Powszechna" la kvara eldono de "Ĉu vi parolas Esperanton?" de A. Pettyn (20 000 ekz.) kaj reeldono de 1 000 disko-kompletoj por tiu ĉi lernolibro. Krome aperis "Rozmówki esperanckie" (Esperanto-konversacioj por turistoj) de A. Pettyn (20 000 ekz.). Ĉe la entrepreno Pola Aer-Linioj LOT, kiu ĉiam pli vaste uzas Esperanton, aperis 6-lingva vortareto (2 000 ekz.) kaj reklamaj LOT-bildkartoj kun E-teksto (6 000 ekz.).

Dank' al la klopodoj de PEA la Gazetarologia Centro en Krakovo aperigis - en sia kvaronjara revuo, enhavanta studojn pri la pola kaj monda gazetaro - pollingvan skizon de red. Stanisław Rams pri la E-gazetaro. La saman skizon oni aperigis en aparta broŝuro esperantigite de Romuald Jałowiecki kaj titolite "Esperanta gazetaro en la mondo".

Kadre de la eldon-agado la Ĉefa Estraro okupiĝis ankaŭ pri la importado de E-libroj el diversaj landoj; en 1973 oni venigis 40 titolojn en la kvanto de 5 200 ekzempleroj. "

*************

Forpasis Prof. Ernest Natalis

Liege. La estraro de la asocio Someraj Universitataj Kursoj (SUK) malĝoje sciigas, ke forpasis ĝia prezidanto, Prof. Ernest Natalis, Stoumont (Belgio) la 28-an de aprilo 1974.

Naskiĝinte en Stoumont la 15-an de junio 1897 Ernest Natalis estis vokita en la Universitaton de Liego por instrui metologion en la kadro de la Instituto pri Psikologio kaj Sciencoj de Edukado. Li ricevis gravajn oficialajn, sciencajn kaj akademiajn honorigojn.

Krom lernolibroj vaste uzitaj en unuagradaj lernejoj, li verkis ankaŭ fakajn internacie konatajn studojn pri lingvaj, pedagogiaj, metologiaj kaj psikologiaj problemoj. Ni menciu ankaŭ lian lernolibron pri la svahila lingvo, la francan-svahilan kaj svahilan-francan vortaron kaj lian lastan imponan bibliografian verkon "Kvaronjarcento da pedagogia literaturo", kiu enhavis i.a. esperantlingvan enkondukon.

Fakte, Prof. E. Natalis estis esperantisto de post 1909 kaj li ĉiam apogis la Internacian Lingvon sur la sciencaj kaj universitataj kampoj. En tiu spirito, li iĝis en 1971 prezidanto de la SUK-estraro. Pro lia morto, la Esperanto-movado perdis diskretan sed profunde influan eminentulon.

Nova telefon-numero en Münster

Pro teknikaj ŝanĝoj en la loka reto Telgte Ulrich Brandenburg, 4401 Westbevern, Vadrup 276 kaj la 30-a Internacia Junulara Konferenco en Münster havas novan telefon-numeron: (02504) 83 60.

Informoj el Francio (lgtx)

La GazetServo Nord-Esperanto demandis la 12 kandidatojn por prezidenteco de Francio. Persone kaj amike respondis V. Giscard d'Estaing kaj F. Mitterand. Kiel konate V. Giscard d'Estaing kun ege malgranda plimulto de la voĉoj gajnis la elekton kaj fariĝis prezidento de Francio.

La eldonejo ASSIMIL daŭre reklamas pri la lernolibro "esperanto sen peno", ankaŭ per plurkolora afiŝo, kies teksto estas: "l'étude de l'espéranto facilite celle des autres langues".

## Nudfulmi por Esperanto

### Vortoj de Grahame Leon-Smith

Alvoko "nudfulmi por Esperanto" estis farita al universitataj studentoj fare de la prezidanto de Brita Esperanto-Asocio, Grahame Leon-Smith. Parolante en la 58-a Brita Kongreso kiu okazis en Universitato de Sheffield, li diris:

"Pli kaj Pli ni rimarkas interesiĝon inter universitataj studentoj nuntempe kaj mi vere ĝojas. Ni deziras ke studentoj kroĉiĝu al niaj idealoj, kampanju por ili kaj se necese striku por ili, aŭ pli bone nudfulmu por ili.

Estus bone por tiuj pompaj ŝtataj instancoj vidi kelkajn studentojn nudfulmi laŭ Whitehall de tempo al tempo, kaj por klarigi la mesaĝon mi diru ke mi persone pretas provizi iun nudfulmanton kun alglueblaj Esperanto-steloj je mia propra kosto..."

## Nova numero de FORUMO

Nürnberg (pp) Ĵus aperis n-ro 2/1974 de FORUMO, Bulteno por internaciaj rilatoj. En ĝi oni trovas ekstraktojn el la registara deklaro de la nova germana federacia kanceliero, Helmut Schmidt, oficialaj reagoj al la registara ŝanĝo en Bonn fare de Pollando, disaŭdigitaj de Pola Radio, resumon de aktuala komentario de d-ro Alfred Macher pri la plivalorigo de la aŭstria ŝilingo laŭ la Esperanto-elsendoj el Vieno kaj aliajn informojn.

## Esperanto en gazetaro

En la rumana gazeto LUMEA n-ro 18 de 25.4.74 aperis sufiĉe longa informo pri Esperanto. En ĝi oni povas legi i.a. "Statistiko farita en la jaro 1952 montris ke la lingvo Esperanto estis uzita de 280 000 personoj el 32 landoj. En 1960, la cifero alproksimiĝas al 500 000."

En la svisa gazeto "Der Landbote", Winterthur, aperis en la eldono de la 25.4.74 el la plumo de ĝia ĉefredaktoro, d-ro Arthur Baur, interesa artikolo pri la lingva konfuzo en la internaciaj organizaĵoj sub la titolo"Die babylonische Sprachverwirrung in den internationalen Organisationen".

En la organo por Aŭstro-Hungaroj kaj Germandevenantoj,"Eintracht", en Nordameriko aperis informo pri la elsendo de la Aŭstria Televido "Esperanto en la lernejoj" laŭ informo de END, germanlingva eldono de Pilo-Press.

***********

## Esperanto en la radio (pp)

Dum preskaŭ tri horoj oni povas aŭdi Esperanto-elsendojn dum dimanĉo, nome je: 6,00 h Varsovio (29 minutojn), 6,45 h Vieno (10 m), Sofio je la 9,30 h (30 m.), 16,30 h (25 m.), 21 h (Romo 20 m.), 21,05 h Sofio (30 m.), 22,00 h (E - anguleto) Varsovio ( 5 m.), 22,30 h Varsovio (29 m.).

Varsovio. Post la enkonduko de la ĉiutaga,tria,vespera elsendo la Esperanto-ekspreso, dimanĉe vespere kaj lunde matene, estas aŭdebla nun dufoje en plena amplekso. Konstantaj eroj estas la rubriko "Niaj aŭskultantoj sciigas" kaj - Pilo-Press notas tion kun kontento - "Novaĵoj de Pilo-Press". Ĉi-foje oni aŭdis interesan sonraportaĵon pri la Zamenhof-solenaĵo en la Viena pola instituto, pri kiu PP jam raportis. - El la sciigoj oni aŭdis, ke estis malfermita la 19a Librofoiro en Varsovio. Vieno. Post la aktuala komentario estis prezentita prelego pri Judenburg.